

Novaĵoj Tamtamas

Internacia Gazeto de Esperanto Jokohama (Hama-Rondo)

エスペラントよこはまのエスペラント文会報

Kun prelego de d-ro Ulrich Lins la 48a Zamenhof-Festo en Kanagavo, 2018

*en dec. 16, 13h00-16h30 ĉe Placo de Kanagawa por Tergloba Civitaneco, en Jokohamo

Entute 42 personoj aliĝis al la Zamenhof-Festo, inkluzive de aŭskultantoj en Tokio, Saitama, Sizuoka kaj Aiti, i.a. por aŭskulti la prelegon de d-ro Ulrich Lins, titolitan “Antaŭ cent jaroj: esperoj pri nova mondo”, okaze de la 100-a jaro de la finiĝo de la (Unua) Mondmilito en 1918. Li komencis la prelegon de la antaŭmilita tempo, ĝis la perspektivo en la 21a jarcento, kaj emfazis la modernan, eĉ tro modernan pensmanieron de L.L.Zamenhof, forpasinta dum la mondmilito.

Nu, fakte la prelego de d-ro Lins estis la dua programero, de 13h30 por 1 horo. Post la malfermo, la unua programero estis kantado de la kanto-grupo en Jokohamo, kaj prezentis jenajn kantojn: “Planedo Nomata la Tero” japane kaj Esperante, kaj kanto laŭdanta la vivon de japana esperantistino Hasegawa Teru

(tamen en la japana).

Post la prelego, la 103-a Universala Kongreso en Lisbono, Portugalio, estis fote prezentita de Kitagawa Ikuko, kaj sekvis salutoj de la 4 rondoj, kiuj konsistigas la Esperanto-Ligon de Kanagavo, la organizanto de tiu ĉi Zamenhof-Festo. Sekvis alvoko al la 9-a Azia-Oceania Kongreso okazonta en la venonta aprilo en Vjetnamio. Post la komuna fotado, oni iris en du apartajn ĉambrojn por fakkunsidoj.

En unu el ili estis interparolo kun d-ro Lins, prezidita de Sibayama Zyun'iti, kaj la parolo ĉefe temis pri la ĵus farita prelego. En la alia estis prezentado de libroj, plus vendejo de Esperantaj libroj. En tiu loko debutis la japanlingva libro de la bedaŭrata s-ro Koyama Takesi pri lia vojaĝado alilanden okaze de sinsekvaj 25 aliĝoj al la Universala Kongreso.



foto: Fuse Kentaro

La 113-a Legokunsido

En la 13a de decembro ni havis la 113-an legokunsidon por "Kie miozotas memor" de Ed Borsboom. Partoprenis kvar personoj.

Neforgeseblaj antaŭuloj "Kie miozotas memor" de Ed Borsboom

Mizro Iwaya

Kiam mi legas libron, mi kutime konscias la verkiston. Sed kiam ni uzas Esperanton en nia vivo, ni plejofte konscias nenion pri la personoj kiuj gardis kaj disvastigis ĝian utilecon. Sed post kiam mi legis tiun libron, mia impresoj pri ili estis ŝanĝita. Nia movado kaj kulturo dependas de ili. Nuna stato estas akumulita klopodo de niaj antaŭuloj.

La libro estas prezento de sume 31 esperantistoj. La aŭtoro estas nederlandano. Pro tio, ne eviteble inkliniĝas ke la aperantoj estas ĉefe eŭropanoj, precipe tiuj en okcidenta eŭropo. Sed fojfoje aperas ankaŭ nomoj de japanoj. Mi ofte vidas ke oni recenzas librojn aŭ personojn per restantaj paperaj dokumentoj. Sed ĉi tie la aŭtoro plejofte recenzas personojn post rekta renkonto kun ili. Por tio li ne ŝparas tempon por viziti malproksimajn samideanojn.

Mi volas ĉi tie prezenti nur du plej impresajn personojn el 31. La unua estas Ernest Drezen. Mi ĝis nun sciis nur ke li aktivis en soveta esperantujo, verkis kelkajn librojn kaj ekzekutita en 1937. Mia svaga kompreno lia estis proleta karaktero. Sed laŭ la aŭtoro li estis pli burĝa ol proleta. Kelkaj kolegoj kritikis lin kiel diktatoran kaj perfidan. Aparte de la vera fakto, mi komprenis ke tia tendenco kondukis lin al neevitebla fatalo.

La dua persono estas Karolo Piĉ, izolita disidentulo en socialisma Ĉeĥio. Li estis kontraŭ la reĝimo kaj ofte protestis al la regantoj. Sed ili simple ignoris lin maldanĝeran. Laŭ tiu procedo li estis izolita eĉ de pragaj esperantistoj, inkluzive de Eli Urbanova. Tial ili ne sciis kie li loĝas, nek kion li faras. Malgraŭ tio lia verko restis fama post jaroj.

Kiu lumigas angulon de nia movado, tiu estas nia valora trezoro. Mi ekhavis pli da estimo al tiuj personoj.

"Ne-forgesu-min"-oj da esperantistoj ("Kie miozotas memor")

Sibayama Zyun'iti

Antaŭparole

Estas biografietoj de 31 esperantistoj, kaj en la titolo estas malkutima verbo 'miozotas', el floro, kies vulgara nomo estas 'ne-forgesu-min'-o. La planto envenis en Japanion de Eŭropo, kaj ĝia nomo fariĝis *wasurenagusa*, t.e. herbo je 'ne-forgesu'. Imitante la vulgaran sencon, mi plukos nur kelkajn el la miozotaj floroj el la verko.

La historiaj personoj

Temas pri famaj esperantistoj jam forpasintaj pli frue ol la fekundaj verktempoj de la aŭtoro.

Adolf Mildwurf (p.96): Naskita kiel pollandano (sed ne polo), li poste agis kiel Ĉe-gvidanto, migris de Danio, Britio, Islando, Norvegio, Grekio ... sed post 1964 lia spuro ne aŭdiĝis, kaj la aŭtoro (kaj la esperantujo) ne scias kiam kaj kie li forpasis.

Ŝiraeŭ (p.124): Ruso, lerninta Esperanton en 1895, verkis en ĝi novelon kaj eĉ romanon, sed kies personeco ne estis konata – sed la aŭtoro etikedas lin "la favorato". Li mortis de malsano en 1933, tial ne atakis lin la "purigo" de Stalino post 1937.

La vizititoj

Multaj el la biografietoj naskiĝis laŭ la efektiva vizito kaj intervjuado al esperantistoj, ŝajne pli aĝaj ol la aŭtoro, kaj laŭ mi tiu parto estas la plej elvokiva.

Walter Kampfrad (p.75): La aŭtoro intencis viziti orient-germanan (tiam tiel) samideanon sen scio de lia adreso, kaj helpe de esperantisto li akiris adreson kaj iris al iu domo sen nomŝildo, kaj li feliĉe renkontis tiun.

Karolo Piĉ (p.103): La aŭtoro vizitis litomiŝlan tombejon – ho ne, la urbon mem, en Ĉeĥoslovakio, inkluzive de la tombejo – por aŭskulti el li.

La aŭtoro multe vizitis sialandajn, nederlandajn homojn aŭ najbarlandajn homojn, sed la aventurema vizitohistorio estas multe pli

impresa.

La leterinto

Luuk Wensing (p.156): Kvankam nederlandano, li maljuntempe loĝis en Hispanio, tial la aŭtoro ne povis intervjui lin rekte. Sed venis lia aŭtobiografia letero, kaj tio aperis en tiu

ĉi verko. Interesas min la komercista kariero de Wensing, ke siatempe li vizitis komercocele Japanion, sed tiam Esperanto pli utilis kiel interpreta lingvo fare de japana esperantisto, ol la anglaĉa lingvo de japana aferisto.

Eseo

Nun aktivas la movado por honorigo de Verda Majo

Doi Ĉieko

De antaŭe multaj esperantistoj atentis kaj esploris pri Verda Majo (Hasegawa Teru). Inter ili estis Miyamoto Masao kaj Kurisu Kei. Ili multe esploris ŝian vivon en Japanio kaj Ĉinio. Ŝia verko pri ŝia vivo “En Ĉinio batalanta” estis multe legata post la Dua Mondmilito. Pri ŝi atentis ne nur japanaj esperantistoj, sed ankaŭ en Ĉinio ŝi estis fama kamarado inter ne nur ĉinaj esperantistoj sed ankaŭ multaj ĉinoj.

Pri ŝia kariero mi ĉi tie simple skribu por homoj, kiuj ne multe scias pri ŝi.

Biografio de Hasegawa Teru (長谷川テル)

- 1912 Naskiĝis en la gubernio Yamanashi.
- 1921 Transloĝiĝis al Tokio.
- 1929 Eniris Porvirinan Pedagogian Altlernejon de Nara.
- 1931 Ŝia fratino Hasegawa Yuki eklernis Esperanton.
- 1932 Junie eklernis Esperanton kun sia amikino; gvidanto estis Miyatake Masamichi. Somere ĉeestis en Esperanto-kurso en Japana Esperanto-Instituto; gvidanto estis Karl Maier. Septembre arestita kun sia amikino pro okupiĝo pri Esperanto. Ambaŭ estis forpelitaj de la lernejo. Aliĝis al JPEU (Japana Prolet-Esperantista Unio).
- 1933 Laboris en JEI (Japana Esperanto-Instituto) en Tokio volontule. Membriĝis al Japana Esperanto-Literatura Societo.
- 1935 Aliĝis al Klara Rondo (Esperanto-Grupo por virinoj). Ŝia fratino Yuki edziniĝis al esperantisto-poeto Nisimura Masao, kaj ekloĝis en Osako.
- 1936 Printempe konatiĝis kun Liu Ren, ĉina esperantisto-studento en Tokio, kaj iom poste

edziniĝis al li. La geedzoj aparte loĝis en Tokio.

1937 Januare Liu Ren reiris al Ŝanhajo. Aprile ankaŭ ŝi iris al Ŝanhajo de la haveno de Jokohamo per la helpo de ĉinaj studentoj en Tokio. Intertempe okazis malpaco inter Ĉinio kaj Japanio. Ŝi agis kun ĉinoj kaj ĉinaj esperantistoj. Ŝi uzis la nomon Verda Majo. Novembre Ŝanhajo fariĝis danĝera pro japana invado, kaj Liu Ren kaj Teru rifuĝis al Kantono. La geedzoj eklaboris en Esperanta Sekcio de Kantona Internacia Asocio. Estis forpelita al Hongkongo, akompanate de Liu Ren. Tie ili vivis en tre malbona kondiĉo.

1938 En julio helpe de Guo Moruo ŝi ekhavis laboron kiel japanlingva parolanto en Radiostacio de Kuomintango en Hankou. Aŭdinte la voĉon de japanlingva parolado, japana aŭtoritatulo rekonis la voĉon de Teru, kaj japana ĵurnalo en Tokio informis, ke Teru estas naciperfidulo. La familianoj de Teru en Tokio suferis pro tio. La geedzoj transloĝiĝis al diversaj urboj en Ĉinio, kaj daŭrigis la laboron alvoki al japanaj soldatoj, kaj ankaŭ aliajn laborojn.

1939 Malsaniĝis je ftizo en Chongqing, sed ŝi daŭre laboris kiel parolanto de radio-elsendo. Guo Moruo forlasis la partion de Kuomintango. La geedzoj ankaŭ sekvis lin. Dum ŝi restis en Chongqing, ŝi verkis “En Ĉinio batalanta” kaj “Flustr’ el uragano”.

1941 Oktobre aŭ decembre naskiĝis la filo Liu Xing.

1945 Finiĝis la milito. La geedzoj transloĝiĝis de Ŝanhajo al Nord-Orienta Distrikto de Ĉinio:

- Shenyan, Harbino kaj fine Jiamusi.
- 1946 Aprile naskiĝis la filino Liu Xiaolan.
- 1947 Januare mortis pro infektiĝo post arta abortigo. Aprile mortis ankaŭ ŝia edzo Liu Ren pro ftizo (?). La postlasitaj infanoj estis en la manoj de Liu Wei, la pli juna frato de Liu Ren.
- post la morto —
- 1948 Japana esperantisto Jui Ĉuunoŝin, kiu restis en Ĉinio post la fino de la milito, tute hazarde renkontiĝis kun Liu Wei, la frato de Liu Ren, kaj aŭdis pri la morto de Teru.
- 1949 Jui Ĉuunoŝin, reveninte al Japanio, informis pri la morto de Teru. Sed estis ne klare, kie kaj kiel vivas la orfoj. (poste klariĝis ke la filo Liu Xing estis sub la zorgo de la onklo Liu Wei, kaj la filino Liu Xiaolan kreskis en orfejo. Ambaŭ ricevis sufiĉe bonan edukadon.)
- 1975 Liu Xiaolan, la filino de Teru, skribis leteron al la onklo Liu Wei por ekscii sian identecon kaj eksciis, ke la patro de Teru laboris en la kvartala oficejo de Setagaya, Tokio. Dume ŝia frato Liu Xing lernadis la japanan lingvon por iam iri al Japanio, kaj eksciinte de la fratino pri la laborloko de sia avo, li skribis leteron al la kvartala oficejo por demandi.
- 1977 Ricevinte la leteron de oficisto en la kvartala oficejo, Liu serĉis pri la familio Hasegawa, kaj eksciis, ke la pli aĝa fratino de Teru loĝas en Numata en la gubernio Gunma. Tiel la gefiloj de Teru povis komunikiĝi kun ŝia fratino, t.e. sia onklino Yuki.
- 1978 Yuki vizitis Ĉinion kaj povis renkontiĝi kun siaj genevoj. Tio estis informita en amaskomunikiloj.
- 1979 Liu Xing kaj Liu Xiaolan estis invititaj al la 66a Japana Esperanto-Kongreso en Kobeo, kaj restis en Japanio dum unu semajno.
- 1980 Televida dramo “La sopiranta stelo” surbaze de la vivo de Hasegawa Teru estis elsendita en Japanio.
- 1981 Liu Xing venis al Japanio por studi dum unu jaro.
- 1984 Liu Xiaolan venis al Japanio por studi.
- 1986 Liu Xiaolan venis por studi modernan historion en Porvirina Universitato de Nara, kiu antaŭe estis Porvirina Pedagogia Altlernejo de Nara, kie ŝia patrino Teru iam studis japanan literaturon.

- 1989 Liu Xiaolan venis al Japanio por plu studi propramone, kaj en 1994 akiris japanan ŝtatancon kaj loĝis en Japanio.
- 1996 Liu Xing mortis pro kancero.
- 2017 Liu Xiaolan forlasis Japanion kaj nun loĝas en Ĉinio aŭ Usono. (Tio ne estas klara.)

.....

Kiel montras la supra kronologia tabelo, Hasegawa Teru tiel vivis kaj forpasis. Japanaj esperantistoj inkluzive de ŝia fratino Yuki serĉadis ŝian spuron. Dank’ al la klopodo de ŝiaj gefiloj klariĝis ŝia vivo post la milito. Libroj pri ŝia vivo kaj ŝiaj verkoj estis eldonitaj de japanaj, ĉinaj kaj ankaŭ germana esperantistoj. Post alveno de la gefiloj al Japanio, la vivo de Teru multe interesis japanojn ekster esperantujo. Ili verkis biografiojn pri ŝi; iuj japanigis la libron pri ŝi; aliaj verkis pri sia vojaĝo spure al la vivsigno de Teru; ankaŭ ŝia filino skribis pri sia patrino Teru kaj pri sia vivo. Tiel nun Teru estas konata ankaŭ de neesperantistaj japanoj.

Nun tio pli konkretiĝis. En 2018, la 105a Japana Esperanto-Kongreso okazis en Nara. Tiam oni havis fakkunsidon “Honorigo al Hasegawa Teru”. Mi estis petita ĉeesti en la kunsido, ĉar mi studis kaj esperantistiĝis en Porvirina Universitato de Nara. La kunsido celis honorigon al Teru, kaj celis ankaŭ interkonatiĝon kun esperantistoj kaj interesitoj pri Teru. Ĉeestis ĉ. 20, el kiuj preskaŭ duono estis esperantistoj. Aliaj ĉ. 10 estis interesitoj-aktivantoj pri Teru. Iuj okupiĝas pri deklama dramo pri Teru; aliaj klopodas doni honorigon al ŝi kaj starigi monumenton por ŝi; estis ankaŭ membroj de Amika Asocio inter Ĉinio kaj Japanio; estis ankaŭ sinjoro, kies patrino jam forpasinta verkis “La vivon de Teru”; estis ankaŭ kolegoj de la filino de Teru ktp.

Post la Japana Kongreso mi ricevis retmesaĝon de iu, kiu studis en la Porvirina Universitato de Nara. Kvankam ŝi ne ĉeestis en la kunsido, ŝi ĉeestis en Esperanto-kurso, instigite de unu el la ĉeestantoj. Ŝi kun iamaj koleginoj volas klopodi por iel honori ŝin, kaj por tio ili vizitos la universitaton por pli bone esplori la aferojn. Mi do sendis al ŝi materialojn, kiujn mi faris kaj kolektis.

Tiel la afero fariĝis iom aktiva ankaŭ ekster Esperantujo, kunlabore kun esperantistoj kaj neesperantistoj.